

eLIBRO

Nikolaj Gogol

Skribaĵoj
de
frenezulo

I N K O



Nikolaj Gogol

SKRIBAĴOJ DE FRENEZULO

El la rusa tradukis N. Z. Osjmak

Lingve reviziita en 2003

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-206-9

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

JUNIO 2003

La 3-an de oktobro

Hodiaŭ okazis eksterordinara aventuro. Mi matene vekigis tre malfrue kaj kiam la servistino, Maŭro, alportis al mi la purigitajn botojn, mi demandis, kioma horo estas. Aŭdinte, ke jam antaŭ longe sonis la deka, mi rapide vestis min. Mi konfesas, ke mi tute ne irus en la departementon, se mi antaŭscius, kian indignan mienon faros nia sekciestro. Li parolas al mi jam de longe:

—Kial, frateto, en via kapo ĉiam estas tia senordo? Vi kelkfoje ĵetas vin, kiel haladziĝinto, la aferon iam tiel miksas, ke la diablo mem ne povas reordigi ĝin; en la titolo vi skribas malgrandajn literojn, kaj en skribaĵo vi notas nek daton, nek numeron.

Jen, malbenita ardeo! Li, kredeble envias, ke mi sidas en la direktora kabineto kaj preparas plumojn por la ekscelenco. Unuvorte, mi ne irus en la departementon, se mi ne esperus renkonti la kasiston, kaj elpeti de tiu ĉi izraelido almenaŭ iom da mono el la salajro antaŭ la pagotago.

Jen li estas kreitaĵo! Ke li donu iam anticipe la monatan salajron — Dio mia sankta — pli rapide venos la terura Dia juĝo; oni petegu, eĉ disŝiriĝu, kiel ajn bezonu,

— li ne donos, la griza diablo! Kaj en la loĝejo, lia propra kuiristino vangofrapas lin, — tio estas konata tra la tuta mondo. Mi ne komprenas, kiaj estas la profitoj de ofico en la departemento: tute ne estas iuj rimedoj; alia afero estas en la gubernia regejo, civilaj kaj regnokasaj ĉambroj: tie, kiam oni rigardas, oni vidas, ke iu sidas en anguleto mem kaj skribas, — la fraketo sur li estas abomena, lia vizaĝego estas tia, ke oni volas kraĉi; sed vi rigardu, kian somerloĝejon li luas! Oni ne portu al li porcelanan vazon orumitan:

—Ĝi, — li diras, — estas donaco por kuracisto.

Kaj al li oni devas donaci — aŭ paron da rapidĉevaloj, aŭ tricentrublan kastoraĵon. Laŭ eksteraĵo li estas tre modesta, parolas tiel delikate:

—Estu afabla, donu al mi tranĉileton por pintigi plu-meton, — sed poste tiel pri-rabos la petanton, ke li lasos nur ĉemizon.

Vere, anstataŭ ĉio, ĉe ni la ofico estas pli nobla, ĉe ni la pureco estas ĉie tia, kian neniam oni vidos en gubernia regejo, niaj tabloj estas faritaj el ruĝa arbo, kaj krom tio ĉiuj niaj estroj estas tre ĝentilaj . . . Jes, mi konfesas, se ne estus nobleco en nia ofico, mi jam de longe lasus la departementon.

Mi vestis malnovan pelton kaj prenis la ombrelon, ĉar tre pluvis. Sur la stratoj estis neniuj; nur solajn virinojn, sin kovrintajn per flankoj de vestaĵoj, rusajn komercis-

tojn sub ombreloj, kaj kurierojn mi renkontis. El nobluloj mi rimarkis nur unu nian fraton oficiston. Mi vidis lin ĉe stratkruciĝo. Kiam mi ekvidis lin, mi tuj diris al mi: "Ehe! ne, kolombeto, vi ne iras en la departementon; vi sekvas fraŭlinon, kiu kuras antaŭ vi, kaj rigardas ŝiajn piedetojn." Kia sovaĝa besto estas nia frato oficisto! Je Dio, li ne cedos al oficiro: preteriru nur iu fraŭlino en ĉapeleto, li nepre ektuŝos ŝin.

Kiam mi pensis tion ĉi, mi ekvidis kaleŝon, kiu estis veturanta al magazeno, preter kiu mi iris.

Mi tuj sciis: tiu ĉi kaleso estas de nia direktoro: "Sed li ne bezonas magazenaĵojn," mi pensis, "tio ĉi en la vero estas lia filino". Mi premis min al la muro. La lakeo malfermis la pordeton, kaj ŝi elflirtis el la kaleŝo, kiel birdeto. Kiam ŝi rigardis dekstren kaj maldekstren, kiam ekbrilis ŝiaj brovoj kaj okuloj . . . mia sankta Dio, mi pereis, pereis tute! Por kiu celo ŝi bezonis elveturi en tia pluva tempo! Ĉu oni povas nun certigi, ke ĉe virinoj pasio al ĉiuj magazenaĵoj ne estas granda? Ŝi ne rekonis min, cetero mi intence mem provis kaŝi min, ĉar sur mi estis pelto tre malpura, kaj krom tio de malnova fasono. Nun oni portas mantelojn kun longaj kolumoj, kaj sur mi estis mallongaj, unu sur la alia, krom tio la drapo estis tute ne delikata. Ŝia hundeto, ne havante tempon ensalti la magazinon, restis sur la strato. Mi konas tiun hundeto-

ton: oni nomas ĝin Meĝi. Post unu minuto, mi subite aŭdis altetan voĉon:

—Estu sana, Meĝi!

Jen vi havas! Kiu tion diris! Mi ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis sub ombrelo du sinjorinojn: unu estis maljunulino kaj la alia junulino; sed ili jam foriris, kaj apud mi eksonis ree:

—Hontu, Meĝi!

Je diablo! Mi vidis, ke Meĝi interflaris kun hundeto iranta post la sinjorinoj.

—Ehe, — mi diris al mi mem, — sufiĉe, ĉu mi estas malsobra? Nur tiel ŝajnas, al mi okazas malofte.

—Ne Fidel, vi vane pensas, — elparolis, mi vidis mem, ke elparolis Meĝi: — Mi estis, hoŭ, hoŭ, mi estis, hoŭ, hoŭ, hoŭ! tre malsana!

Ha ci, hundaĉo! Jen, kanajlo! Mi konfesas, ke mi mi-regis, aŭdinte ĝin home parolanta; sed poste, kiam mi bonege konsideris ĉion ĉi, tuj mi ĉesis miri. Efektive, en la mondo jam okazis multe da similaj ekzemploj. Oni diras, ke en Anglujo aperis fiŝo, kiu parolis du vortojn en tiel stranga lingvo, ke la sciencistoj jam tri jarojn penas difini ĝin kaj ankoraŭ ĝis nun nenion difinis. Mi ankaŭ legis en gazetoj pri du bovinoj, kiuj eniris en butikon kaj petis por si funton da teo. Sed, mi konfesas, mi plej multe miris, kiam Meĝi diris:

—Mi skribis al vi, Fidel, vere, Polkano ne liveris mian leteron! Je diablo! Mi en mia tuta vivo ne aŭdis, ke hundo povas skribi. Regule skribi povas nur nobelo. Cetere, kelkfoje okazas, ke iuj komercistoj, kontoristoj kaj eĉ vilaĝaj homoj skribetas, sed ilia skribo estas pli meĥanika: nek komoj, nek punktoj, nek stilo.

Tio ĉi min mirigis. Mi konfesas, de antaŭ nelonga tempo mi komencas aŭdi kaj vidi okazaĵojn, kiajn ankoraŭ neniu aŭdis kaj vidis.

—Mi iru, — mi diris al mi mem, — post tiu ĉi hundaĉo, kaj eksciu, kio ĝi estas, kaj pri kio ĝi pensas.

Mi disrulis mian ombrelon kaj ekiris post la du sinjorinoj. Ni trairis stratojn: Goroĥovan, Meŝĉanskan, Stolarnan, fine aliris al la Kokuŝkina ponto kaj haltis antaŭ granda domo.

—Tiun ĉi domon mi konas, — mi diris al mi mem, — estas la domo de sinjoro Zvjerkov.

Kia domo! Kiom da homoj en ĝi loĝas, kiom da kuiristinoj, kiom da alveturintoj! Kaj da niaj fratoj-oficistoj, — kiom da hundoj, —unu sidas sur la alia kaj per tria pelas. Tie estas unu mia amiko, kiu bone ludas trumpeton.

La sinjorinoj suriris en la kvinan etaĝon.

—Bone, — mi pensis, — nun mi ne iru, sed rimarku la lokon, kaj ne lasu la unuan okazon por utiligi ĝin.

La 4-an de oktobro

Hodiaŭ estas merkredo, kaj tial mi estis ĉe nia ĉef-estro en la kabineto. Mi intence iris pli frue, kaj sidiĝinte preparis ĉiujn plumojn. Nia direktoro devas esti saĝa homo. Lia tuta kabineto estas plena de libraj ŝrankoj. Mi legis la nomojn de kelkaj libroj: ĉio estas scienco, tia scienco, ke por ni, fuŝistoj, ne estas eble eĉ tuŝi ĝin, — ĉio estas presita france aŭ germane. Kaj, se vi rigardas lian vizaĝon: hu, kia graveco brilas en liaj okuloj! Mi ankoraŭ neniam aŭdis de li superfluan vorton. Nur kiam mi donas al li skribaĵojn, li kelkfoje demandas:

—Kiel estas ekstere?

—Malseke, via ekscelenco, — mi respondas.

Jes, li ne kompareblas kun ni, — li estas regema homo! Tamen mi rimarkas, ke li aparte amas min. Se amus min li kaj la filino! Ho, estas kanajlaĵo . . . Sed nenion signifas, nur estu silento! . . . Mi legis "Abeleton". Kiel malsaĝa popolo estas la francoj! Nu, kion ili volas? Je Dio, mi ilin ĉiujn vergus! Tie mi ankaŭ legis tre agrablan prezenton de balo, priskribitan de bienhavanto el Kursk. La bienhavantoj el Kursk bone skribas. Post tio mi rimarkis, ke eksonis duono antaŭ la unua horo; kaj nia direktoro

ankoraŭ ne eliris el sia dormejo. Sed ĉirkaŭ duono antaŭ la dua fariĝis okazo, kiun povas priskribi neniuj plumoj. La pordo malfermiĝis. Mi pensis, ke la direktoro venas, kaj mi desaltis de mia seĝo kun la skribaĵoj; sed estis ŝi, — ŝi mem! Sanktuloj, kiel ŝi estis vestita! La vestaĵoj sur ŝi estis blankaj, kiel cigno, — hu, kiel luksaj! Kaj kiam ŝi ĵetis rigardon sur min, la suno! Je Dio, la suno! Ŝi salutis kaj demandis:

—Ĉu paĉjo ne estas tie ĉi?

Aj, aj, aj! Kia voĉeto! Kanario, vere kanario!

—Via ekscelenco! — mi intencis diri, — ne ordonu ekzekuti min, kaj se vi jam volas ekzekuti, tiam ekzekutu min vi mem per via ekscelenta maneto; — sed je diablo, mia lango pro nekonata kaŭzo ne obeis min, kaj mi diris nur: — Tute ne.

Ŝi rigardis min kaj perdis sian naztukon. Mi ĵetegis min al la tuko, glitis sur la malbenita pargeto kaj preskaŭ rompintis mian nazon. Tamen mi detenis min kaj levis la tukon. Sanktuloj, kia tuko! Plej maldika batista bonodoraĵo, tute bonodoraĵo! Ĝi odoregis per generaleco! Ŝi dankis kaj apenaŭ ridetis, tiel ke ŝiaj dolĉaj lipetoj restis preskaŭ senmovaj, kaj post tio ŝi foriris. Mi sidis ankoraŭ unu horon, kiam subite eniris lakeo kaj diris:

—Aksentij Ivanoviĉ, iru hejmen, la sinjoro jam veturis el la domo.

Mi ne povas toleri la lakearon: ĉiam ili sidas en la antaŭĉambro kiel sinjoregoj, kaj eĉ per kapo ne deziras saluteti; plie: foje unu el tiuj kanajloj intencis regali min per flartabako sen leviĝi de sia seĝo.

—Ĉu ci scias, malsaĝa malnoblulo, ke mi estas oficisto, ke mia deveno estas nobla?

Tamen mi prenis la ĉapelon kaj metis mem sur min la pelton, ĉar tiuj sinjoroj neniam faras servon, kaj eliris. Hejme mi plejparte kuŝis sur la lito. Poste mi transkribis tre belajn versetojn: "Mi animeton dum horeto ne vidante, pensis, ke tutan jaron mi ŝin ne vidis; mian vivon ekmalamante, ĉu oni povas vivi plu, mi diris."

Kredeble tiujn ĉi versetojn Puŝkin verkis. Vespere, envolvinte min en pelton, mi iris al la parada pordo de ŝia ekscelenco kaj atendis longe por vidi ŝin ankoraŭ unu fojon, kiam ŝi eliros por sidiĝi en kaleŝon; sed ne, ŝi ne eliris.

La 6-an de novembro

Diabligis min la sekciestro. Kiam mi iris en la departamenton, li vokis min al si kaj komencis paroli tiel:

—Nu diru, mi petas vin, kion vi faras?

—Kiel, kion? Mi nenion faras, — mi respondis.

—Nu, vi pripensu bonege! Vi ja havas pli ol kvardek jarojn. Estas tempo saĝiĝi. Kion vi imagas al vi? Vi pensas, ke mi ne konas ĉiujn viajn petolojn? Vi ja amindumas la filinon de la direktoro! Vi gardu vin, vi pensu nur, kiu estas vi? Vi ja estas nulo, nenio pli. Vi ja nenion, eĉ unu kopekon, havas. Rigardu almenaŭ en spegulo vian vizaĝon; ĉu vi povas eĉ penseti pri ŝi!

Je diablo, ke lia vizaĝo similas iom al apoteka boteleto, ke li havas sur sia kapo flokon da haroj, volvitan en tufo, ke li tenas sian kapon iom supren kaj ŝmiras ĝin per ia pomado — pro ĉio ĉi li pensas, ke nur al li nun ĉio estas permesita. Mi komprenas, komprenegas, kial li koleras je mi: li envias, li kredeble vidis la signojn de favoro de ŝi faratajn prefere al mi.

Sed mi kraĉas sur lin! Ĉu tre gravas la rango de kortega konsilanto! Ke li surpendigis oran ĉeneton al la poŝ-

horloĝo kaj mendas al si tridekrublajn botojn, — sed pro ĉio tio la diablo tute prenu lin! Mi ankaŭ devenas ne de iuj sennobluloj, ne de tajloroj kaj ne de suboficiraj infanoj — mi estas nobelo! Mi ankaŭ povas atingi gravan rangon. Mi havas nur kvardek du jarojn, la tempo estas tia, ke mia servofico, laŭ efektiveco, nur komenciĝas. Iom atendu, amiko, kaj mi estos regimentestro! Kaj, se Dio helpos, mi estos io pli granda! Tiam mi luos por mi loĝejon, povas esti, pli bonan ol la via. Kion do vi imagas al vi en via kapo, ke, krom vi, tute ne ekzistas bona homo? Ekzemple: oni donu al mi bonan frakon mode kudritan, kaj mi ligu sur min tian kravaton, kian vi portas, tiam vi ne valoros eĉ miajn plandojn. Mi ne havas monon — jen efektiva estas mia mizerego.

La 8-an de novembro

Mi estis en teatro. Oni prezentis la rusan malsaĝulon Filatkon. Mi ridegis. Estis prezentita ankaŭ iu vodevilo kun amuzaj versetoj pri advokatoj, precipe pri unu kolegia registro; la versetoj estis tiel libere skribitaj, ke mi miris, kiel povis permesi ilin la cenzuro; sed pri komercistoj oni rekte parolas, ke ili prifriponas la popolon, kaj ke iliaj filetoj diboĉas kaj penas esti nobeloj. Pri ĵurnalistoj ankaŭ estis legita tre amuza verseto: ke ili ŝatas ĉion mallaŭdi, kaj ke la aŭtoro petas de la publiko defendon. Tre amuze verkistoj skribas nun teatraĵojn. Mi ŝatas viziti la teatron, se mi nur havas en poŝo kopekon, mi ne povas ne viziti ĝin. Sed inter niaj oficistoj estas tiaj porkoj: ili, kiel vilaĝanoj, tute ne vizitas la teatron, krom se oni donas al ili senpagan bileton. Unu artistino bonege kantis. Mi memoris pri tia . . . Ho, kanajlaĵo! Nenio, nenio . . . estu silento.

La 9-an de novembro

Je la oka horo mi ekiris en departementon. La sekcies-tro kondukis, kvazaŭ li ne vidus, ke mi eniris. De mia flanko same — kvazaŭ inter ni nenio okazis. En la departemento mi transrigardis kaj komparis skribaĵojn. Post kvar horoj mi eliris kaj iris hejmen preter la direktora loĝejo, sed neniun mi vidis. Post tagmanĝo mi plejparte kuŝis sur la lito.

La 11-an de novembro

Hodiaŭ mi sidis en la kabineto de nia direktoro, preparis por li 23 plumojn, kaj por ŝi . . . aj! aj! . . . por ŝia ekscelenco kvar plumojn. Li tre ŝatas, ke estu preparitaj multaj plumoj. Hu! li devas esti kapego! Li ĉiam silentas, sed en la kapo, mi kredas, li ĉion konsideras. Mi dezirus scii, kion li prefere pensas, kio okazas en tiu kapo. Mi dezirus pli proksime vidi la vivon de ĉi tiuj sinjoroj, — ĉiujn iliajn farojn, diversajn kortegajn ceremoniojn: kiaj ili estas, kion ili faras en sia societo — jen, kion mi volus ekscii! Mi intencis kelkfoje komenci interparoladon kun ekscelenco, sed, je diablo, mia lango tute ne obeas al mi; ĝi nur povas eldiri: "malvarme" aŭ "varme estas ekstere", kaj elparolos plu nenion. Mi dezirus rigardi en la gastoĉambrom, kien oni vidas nur kelkfoje tra la malfermita pordo; post la gastoĉambro mi ankaŭ dezirus rigardi alian ĉambrom. Ho, kiel luksa estas tie la ornamo! Kiaj devas esti la speguloj kaj porcelanaĵoj! Mi volus rigardi tien, tiun parton, kie estas ŝia ekscelenco, — jen kien mi vlegus! En la buduaron por vidi, kiel tie staras diversaj bagatelaĵoj: flakonoj, vitraĵoj, tiaj floroj, ke oni eĉ spiri timas sur ilin, kiel kuŝas tie disjetitaj ŝiaj

vestaĵoj, kiuj estas pli similaj al aero ol al vestaĵoj. Mi dezirus rigardi la dormejon . . . Ja tie, mi kredas, estas mirindaĵoj, plie, mi opinias, ke tie estas paradizo, kia ne ekzistas eĉ en la ĉielo. Mi volus vidi la benketon, sur kiun ŝi, sin levinte el la lito, starigas sian piedeton, kiel oni vestas sur tiun piedeton ŝtrumpeton blankan kiel neĝo . . . Aj! aj! aj! nenio, nenio . . . estu silento. Hodiaŭ, tamen, kvazaŭ lumo min konsiderigis: mi ekmemoris tiun interparolon de la du hundaĉoj, kiun mi aŭdis en Nevskij-prospekto.

—Bone, — mi pensis en mi mem, — nun mi scios ĉion. Estas bezonate proprigi la korespondaĵon, kiun havis inter si tiuj sentaŭgaj hundaĉoj; el tiu korespondaĵoj mi ekscios ion.

Mi konfesas, ke mi foje eĉ vokis al mi Meĝin kaj diris al ĝi:

—Aŭdu, Meĝi, jen ni nun estas solaj; mi, se ci volas, mi eĉ ŝlosos la pordon kaj nin neniu vidos; diru al mi ĉion, kion ci scias pri la fraŭlino: pri kio kaj kiel ŝi pensas? Mi ĵuras, ke mi malkovros al neni.

Sed la ruza hundaĉo subpremis la voston, kuntiriĝis duoble kaj silente eliris tra la pordo, kvazaŭ ĝi nenion estus aŭdinta. Mi jam de longe suspektas, ke hundo estas pli saĝa ol homo; mi estas eĉ certa, ke ĝi povas paroli, sed ĝi havas nur ian obstinecon. Hundo estas eksterordinara politikisto: ĝi rimarkas ĉion, ĉiujn homajn paŝojn.

Ne, kio ajn okazus, mi morgaŭ do iru en la domon de sinjorino Zvjerkova kaj pridemandu Fidelon, kaj propri-
gu ĉiujn leterojn, kiujn skribis al ĝi Meĝi.

La 12-an de novembro

Je la dua posttagmeze mi ekiris kun la intenco nepre vidi Fidelon kaj eldemandi ĝin. Mi ne povas toleri brasikon, kiu odoregas en Mjeŝčanska strato el ĉiuj malgrandaj butikoj; krom tio tra la pordego de ĉiu domo odoras tia abomenaĵo, ke mi devis kovri mian nazon kaj plej rapide kuri. Kaj sentaŭgulaj metiistoj ellasas tiom da fumo kaj fumaĵo, ke homo nobla tute ne povas promeni tie. Kiam mi iris sur la sesan etaĝon kaj sonorigis la pordan sonorileton, eliris knabineto ne tre malbona, havanta malgrandajn lentugojn. Mi rekonis ŝin. Ŝi estis tiu sama, kiu iris kun la maljunulino. Ŝi iom ruĝiĝis, kaj mi tuj konsideris, ke ŝi, kolombineto, volas havi fianĉon.

—Kion vi deziras? — ŝi demandis min.

—Mi deziras paroli kun via hundeto, — mi respondis. La knabineto estis malsaĝa! Mi tuj sciis, ke ŝi estas malsaĝa! La hundaĉo samtempe alkuris bojante; mi tuj kaptis ĝin, sed la abomenulo preskaŭ mordis mian nazon, kaj mi forĵetis ĝin. Tamen mi ekvidis en angulo ĝian kuŝkorbon. He! jen mi bezonas nur ĝin! Mi iris al la korbo, manmiksitis ĝian pajlon kaj, je eksterordinara plezuro mia, mi eltiris malgrandan faskon da paperetoj. La abo-

mena hundaĉo, vidante ĉion ĉi, komencis mordi mian tibion, kaj poste, kiam ĝi ekvidis, ke mi prenas la paperetojn, ĝi komencis krieti kaj karesiĝi, sed mi diris:

—Ne, kolombineto, adiaŭ! — kaj ĵetis min por forkuri.

Mi opinias, ke la fraŭlino akceptis min kiel frenezulon, ĉar ŝi treege timis. Alveninte hejmen, mi volis tuj min okupi per la esploro de tiuj leteroj, ĉar vespere apud la kandeloj mi iom malbone vidas, sed Maŭro malhelpis, komencante purigon de la planko. Ĉiuj ĉi tiuj vilaĝaninoj estas ne ĝustatempe puremaj. Pro tiu kaŭzo mi iris promeni kaj pripensi mian lastan aventuron. Nun mi, fine, mi konas ĉiujn aferojn, projektojn, ĉiujn igojn kaj iĝojn kaj, fine, mi komprenos ĉion. Tiuj ĉi leteroj malkovros al mi ĉion. La hundoj estas popolo saĝa, ili konas ĉiujn politikajn rilatojn kaj tial, kredeble, en la leteroj ĉio estas skribita pri la "nia": pri lia portreto kaj pri ĉiuj agoj de tiu viro. Tie, kredeble, troviĝos io pri ŝi, kio . . . Nenio, estu silento! Mi revenis hejmen vespere. Plejparte mi kuŝis sur la lito.

La 13-an de novembro

Nun mi rigardu! La letero estas sufiĉe legebla, tamen en la skribmaniero estas ia hundaĵo. Mi legu: "Ĉarma Fidel! Mi ankoraŭ ne povas kutimiĝi al via burĝa nomo. Ĉu oni ne povus nomi vin pli bone? Fidel, Roza — kia malnobla tono! Tamen ĉion ĉi ni metu flanken. Mi estas tre ĝoja, ke ni elpensis skribi unu al la alia."

La letero estas skribita tre regule. La punktaro kaj eĉ la litero "e" staras sur siaj lokoj. Ja, tiel, oni konsentu, ne skribas eĉ nia sekciestro, kiu diras, ke li lernis en iu universitato. Mi rigardu pluen.

"Mi diras tion pro sperto, kvankam en la mondo mi ne kuris pluen, ol al la pordego de nia korto. Ĉu ne mia vivo fluas kontente? Mia fraŭlino, kiun paĉjo nomas Sofi, treege amas min."

Aj, aj! . . . nenio, nenio! estu silento!

"Paĉjo ankaŭ karesas min ofte. Mi trinkas teon kaj kafon kun kremo. Ho, mia ĉarma, mi devas diri al vi, ke mi tute ne vidas plezuron en grandaj ĉirkaŭlekitaj ostoj, kiujn manĝegas nia Polkano en la kuirejo. Nur ostoj de ĉasaĵo estas bonaj kaj nur tiam, kiam neniue elsuĉis el ili la medolon. Estas tre bone kunigi kelkajn saŭcojn kune

sed sen kaporoj kaj verdaĵo; sed mi scias nenion pli mal-bonan, ol la kutimo doni al la hundoj rulitajn buletojn el pano. Iu, sidanta ĉe tablo, sinjoro, kiu en siaj manoj tenis diversajn abomenaĵojn, komencas per tiuj samaj manoj dispecigi panon, alvokas vin kaj enŝovas buleton en viajn dentojn. Oni povus forigi ĝin, sed tio ne estus ĝentila, — nu, tial mi manĝas, kun abomeno, sed manĝas . . .”

Diablo scias, kia sensencaĵo! Ĉu ne estis priskribota objekto pli bona?! Tamen mi rigardu alian paĝon, ĉu ne troviĝos io pli interesa.

” . . . Mi estas preta sciigi al vi kun granda volo pri la ĉefa sinjoro, kiun Sofi nomas paĉjo. Tiu ĉi sinjoro estas tre stranga homo . . .”

Ha! jen fine! jes, mi sciis, — hundoj havas politikajn rigardojn al ĉiuj objektoj. Vidu, kio estas paĉjo.

” . . . Estas tre stranga homo. Li plej multe silentas, kaj parolas tre malofte. Tamen antaŭ unu semajno li senĉese ripetadis al si mem: ”Ĉu mi ricevos, aŭ ne ricevos?” Li prenis en unu mano papereton, premis la duan manon malplene kaj ripetis: ”Ĉu mi ricevos, aŭ ne ricevos?” Unufoje li sin turnis kun demando al mi: ”Kiel, Meĝi, ĉu ci pensas, ke mi ricevos, aŭ ne ricevos?” Mi tute nenion povis kompreni, mi flaris lian boton kaj foriris. Plie, mia ĉarma, post unu semajno paĉjo revenis hejmen tre ĝoja; dum mateno venis al li sinjoroj en uniformoj,

kaj pro io ili gratulis lin. Tagmanĝante, li estis tiel gaja, kiel neniam ankoraŭ mi vidis lin, — li rakontis eĉ anekdotojn. Kaj post la tagmanĝo li levis min al sia kolo kaj diris: "Vidu tion ĉi, Meĝi, — kio ĝi estas?" Mi vidis ian rubandeton; mi flaris ĝin, sed ĝi tute ne bonodoris; mi eĉ lekis ĝin: ĝi estis iom sala."

Hm! Mi opinias, ke tiu ĉi hundaĉo jam tro kuraĝas . . . Oni ja devus vergi ĝin! Tamen ĉio ĉi signifas, ke ĝi estas honoramanto! Tion estas bezonate memori.

". . . Adiaŭ, mia ĉarma! Mi kuras kaj la ceteraj . . . kaj la ceteraj . . . Morgaŭ mi finos la leteron. — Nun, bonan tagon! Nun mi ree estas kun vi. Hodiaŭ mia fraŭlino Sofi . . ."

Ha, ha! Nun mi rigardu ion pri Sofi. Ho, kanajlaĵo! . . . Nenio, nenio . . . Mi daŭrigos.

". . . Mia fraŭlino Sofi tumultis eksterordinare, — ŝi ornamis sin por balo, kaj tial mi tre ĝojis, ke dum ŝi forestos, mi povos skribi al vi. Mia Sofi estas ĉiam ĝoja por veturi balon, kvankam ornamente sin, ŝi preskaŭ ĉiam koleras. Mi ne povas kompreni, kial homoj sin vestas kaj ornamas. Kial ili ne iras, ekzemple, kiel mi? Estus bone kaj trankvile. Mi ne komprenas, mia ĉarma, la plezuron de veturado al balo. Sofi revenas hejmen de balo ĉiam matene je la sesa, kaj mi preskaŭ ĉiam divenas laŭ ŝia pala kaj maldika vizaĝo, ke oni ne donis al ŝi, malfeliĉulino, tie por manĝi. Mi konfesas, ke mi neniam povus tiel

vivi. Se oni ne donus al mi saŭcon kun tetrao, aŭ rostaĵon de kokajflugiloj, tiam . . . mi ne scias, kio mi fariĝus. Ankaŭ estas bona saŭco kun kaĉeto; sed karoto, aŭ rapo, aŭ artiŝoko estos neniam bonaj.”

Eksterordinare malegala estas la stilo! Tuj oni povas konkludi, ke ne homo skribis: ĝi komenciĝas dece, sed finiĝas per hundaĵo. Mi tamen rigardu ankoraŭ unu letereton. En ĝi io estas priskribita iom longe. Hm! kaj ne estas notita dato.

”Ho, ĉarmulino, kiel sentiĝas la proksimiĝo de printempo! Mia koro batas, kvazaŭ ĝi atendas iun. En miaj oreloj estas ĉiam bruoj, tial mi ofte, levinte piedeton, staras kelkajn minutojn aŭskultante ĉe pordo. Mi malkovras al vi, ke mi havas multe da amindumantoj. Mi ofte, sidante sur la fenestro, rigardas ilin. Ho, se vi sciis, kiaj malbeluloj estas inter ili! Iu, plej fuŝe kreita, terure malsaĝa korthundo kun tre malsaĝa vizaĝo, iradas plej grave sur la strato kaj imagas, ke ĝi estas la plej fama persono, kaj ĝi pensas, ke ĉiuj rigardas ĝin. Tute ne! Mi eĉ mian atenton ne turnis al ĝi. Tiel, kvazaŭ mi tute ne vidus ĝin. Kaj kia terura dogo haltas kelkfoje antaŭ mia fenestro! Se ĝi nur starus sur la malantaŭaj piedoj, kion ĝi, malĝentilulo, kredeble ne povas fari, ĝi estus pli alta je tuta kapo ol paĉjo de mia Sofi, kies kresko ankaŭ estas sufiĉe alta kaj dika. Tiu malĝentilulo estas kredeble la plej terura arogantulo! Mi murmuris al ĝi, sed ĝi tute

malŝatis mian murmuron; ĝi eligis sian langon, pendigis siajn grandajn orelojn kaj rigardis mian fenestron, tia vilaĝulo ĝi estas!

”Sed ĉu efektive, mia ĉarma, vi opinias, ke mia koro indiferente rilatas al ĉiuj amserĉoj? Ho ne! . . . Se vi vidus unu kavaliron, nomata Trezoro, ofte transrompan-
ta la baron de najbara korto, . . . Ho, mia ĉarma, kiel bela estas ĝia vizaĝeto! . . .”

Tjfu (li kraĉas), je diablo! . . . Kia abomenaĵo!

Kiel oni povas plenigi leterojn per tiaj malsaĝaĵoj! Oni donu al mi homon! Mi volas vidi homon; mi postulas manĝaĵon spiritan lian, kiu nutrus kaj dolĉigus mian animon; kaj anstataŭ tio, kio estas malsaĝaĵoj . . . Mi rigardu alian paĝon, ĉu ne troviĝos io pli bona?

” . . . Sofi sidis ĉe la tablo kaj ion kudris. Mi rigardis tra la fenestro, ĉar mi amas ĉirkaŭrigardi la preterirantojn, subite eniris la lakeo kaj diris: ’Teplov!’ — ’Petu lin eniri!’ ekkriis Sofi kaj ĵetis sin por ĉirkaŭpreni min. ’Ho, Meĝi, Meĝi! Se ci scius, kiu venis: tiu ĉi estas nigraharulo, kamer-junkero kun nigregaj okuloj, kiel agato!’ Kriinte tion ĉi, Sofi kuris en sian ĉambron. Post minuto, eniris juna kamer-junkero, havanta nigrajn vangoharojn; li iris al spegulo, bonigis siajn harojn kaj ĉirkaŭrigardis la gastoĉambron. Mi ekmurmuris kaj sidiĝis sur mia loko. Sofi baldaŭ eniris kaj gaje resalutis lian salutegon; mi do, kvazaŭ nenion rimarkante, daŭre rigardis tra la fenestro,

tamen mi klinis mian kapon iom flanken kaj penis subaŭdi, pri kio ili parolas. Ho, mia ĉarma, pri kia sensencaĵo ili parolis! Ili parolis pri sinjorino, kiu en dancoj faris maldecan paŝon; pri iu sinjoro Bobov, kiu similis en sia ĵabo al cikonio, tiel ke li, dancante, preskaŭ falis; pri iu sinjorino Lidina, kiu imagas, ke ŝi havas bluajn okulojn, dum ŝiaj okuloj efektive estas verdaj; kaj pri ĉio simila. 'Ho,' mi pensis en mi mem: 'Se oni komparus la kamer-junkeron kun Trezoro! Ĉielo! Kia diferenco! Unue, la vizaĝo de la kamer-junkero estas tute ebena, larĝa kaj ĉirkaŭata de vangoharoj, kvazaŭ li ĉirkaŭligis ĝin per nigra tuko; kaj la vizaĝeto de Trezoro estas maldiketa, kaj sur la frunto mem estas blanka makuleto. La talion de Trezoro oni eĉ ne povas kompari kun talio kamerjunkera. Kaj la okuloj, agoj, lertecoj de Trezoro estas tute aliaj. Ho, kia diferenco inter ili! Mi ne scias, mia ĉarma, kion bonan ŝi trovas en sia Teplov, kial li ravigas ŝin?' "

Al mi mem ŝajnas, ke tie ĉi estas ia malkompreniĝo. Ne povas esti, ke sinjoro Teplov tiel enamigis sin en ŝin. Mi rigardos pluen:

"Al mi ŝajnas, ke, se plaĉas al ŝi tiu ĉi kamer-junkero, tiam tiu oficisto, kiu sidas en la paĉja kabineto, ankaŭ baldaŭ povos ekplaĉi al ŝi. Ho, mia ĉarma, se vi scius, kia malbelulo estas tiu oficisto! Li estas tute kiel testudo en sako . . ."

Kiu do estas tiu ĉi oficisto? . . .

”Lia familia nomo estas plej stranga. Li ĉiam sidas kaj preparas plumojn. La haroj sur lia kapo estas kiel fojno. La paĉjo kelkfoje sendas lin anstataŭ servisto.”

Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi abomena hundaĉo aludas min. Kiam do miaj haroj similis al fojno?

”Sofi tute ne povas deteni sin de rido, kiam ŝi rigardas lin.”

Ci mensogas, malbenita hundaĉo! Kiel abomena estas ĝia lango! Kiel se mi ne scius, ke ĉio ĉi estas artifiko de envio? Ĉu mi ne scias, kies estas tie ĉi la artifaĵoj? Tiuj ĉi artifaĵoj devenas de la sekciestro. Tiu homo ja ĵuris pri nepacigebla malamikeco kaj senĉese malutilas al mi, apud ĉiu paŝo mia li malutilas. Mi tamen rigardu ankoraŭ unu letereton; tie, povas esti, cirkonstanco malkovriĝos per si mem.

”Mia ĉarma Fidel, pardonu min pro mia longa silentado. Mi estis tute ravigita. Tute vere iu verkisto diris, ke la amo estas dua vivo. Krom tio, en nia domo okazis grandaj sanĝoj. La kamer-junkero nun estas ĉe ni ĉiutage. Sofi estas sensaĝe enamiĝinta en lin. Paĉjo estas tre gaja. Mi eĉ aŭdis de nia servanto Grigorio, kiu, balaante la plankon, ĉiam parolas kun si mem, ke baldaŭ estos geedziĝo, ĉar paĉjo nepre volas sian filinon Sofi edziniĝi aŭ al generalo, aŭ al kamer-junkero, aŭ al regimentestro . . .”

Je diablo. mi ne povas legi plue . . . Ĉie estas aŭ kamer-junkeroj, aŭ generaloj. Ĉion, kio estas plej bona en la mondo, prenas aŭ kamer-junkeroj, aŭ generaloj. Oni trovas al si malgrandan riĉecon, oni pensas atingi ĝin per la mano, — sed subite kamer-junkero, aŭ generalo kaptas ĝin por si mem. Diablo malbenita! Mi deziregas fariĝi mem generalo, tute ne por ricevi ŝian manon, kaj cetere, — ne, mi volas esti generalo nur por vidi, kiel ili saltos ĉirkaŭ mi, kiel ili faros diversajn kortegajn agojn kaj farojn, poste mi dirus al ili, ke mi volas kraĉi sur ilin ambaŭ. Je diablo, estas ĉagrene al mi! Mi disŝiris en floketoj la leterojn de la malsaĝega hundaĉo.

La 3-an de decembro

Ne povas esti. Estas mensogo! Ne okazos geedziĝo! Ja kion signifas lia kamer-junkereco? Ĝi ja estas indeco, sed nenio pli: ĝi ne estas objekto videbla, kiun oni povus preni en manojn. Per kamer-junkereco ja ne fariĝis tria okulo sur lia frunto. Lia nazo ja ne estas farita el oro, sed ĝi estas farita tiel, kiel estas farita mia kaj ĉiuj aliaj: per sia nazo li ja flaras, sed ne manĝas, — ternas, sed ne tusas. Mi jam kelkfoje volis difini, de kio devenas diversaj diferencoj. Pro kio mi estas titola konsilanto? Kial mi estas titola konsilanto? Povas esti, ke mi estas grafo aŭ generalo kaj nur ŝajnigas, ke mi estas titola konsilanto. Povas esti, mi mem ne scias ĝis nun, kiu mi estas. Ja laŭ la historio oni povas vidi multe da sekvantaj ekzemploj: kelkfoje oni malkovras, ke iu simplulo, eĉ ne nobelo, sed simpla burĝo, aŭ vilaĝano, efektive estas grandsinjoro aŭ barono aŭ . . . aŭ kiel tio estas . . . Se ĉe vilaĝano povas montriĝi tia graveco, — tiam kia nobelo povas montriĝi? Ekzemple, — subite mi, vestinte generalan uniformon, eniras ĉe la "nia": ĉe mi — sur mia dekstra ŝultro estas epoleto kaj sur maldekstra ŝultro ankaŭ estas epoleto, kaj trans la ŝultro kaj brusto estas

blua rubando, — do, kion mia belulino tiam diros? Kaj paĉjo mem, nia direktoro, kion li tiam diros? Ho, tiu ĉi homo estas granda honoramanto. Li estas masonisto, tute masonisto; kvankam li ŝajnigas sin tia kaj alia, sed mi tuj rimarkis, ke li estas masonisto: se li donas por saluti al iu sian manon, li donas nur du fingrojn. Sed ĉu mi ne povas esti rekomencota dum tiu ĉi minuto per generaleco, aŭ per intendantestreco, aŭ per io simila? Tamen mi nur deziras scii, kial mi estas titola konsilanto! Kial do mi estas — titola konsilanto?

La 5-an de decembro

Mi hodiaŭ dum la tuta mateno legis gazetojn. Eksterordinaraj aferoj okazas en Hispanujo. Mi eĉ ne povis bone kompreni ilin. Oni sciigas, ke la hispana trono estas forigita, kaj tial ranguloj, elektante heredanton, trovas sin en embarasa situacio, kaj tial do okazas ribeloj. Ĉiuj ĉi okazoj ŝajnas al mi tre strangaj. Kiel do povas esti forigita la trono? Oni diras, ke iu *dona* devas heredi la tronon. *Dona* ne povas heredi tronon, tute ne povas. Heredi tronon devas reĝo. "Sed", oni diras, "reĝo ne ekzistas". Ne povas esti, ke reĝo ne ekzistu. Regno ne povas esti sen reĝo. Reĝo ekzistas, sed li kredeble trovas sin ie kaŝita. Li eble sin trovas ie, sed iuj familiaj kaŭzoj, aŭ timoj de la flankoj de najbaraj regnoj, ekzemple de Francujo, aŭ de aliaj, devigis lin kaŝi sin, aŭ pri tio estas aliaj kaŭzoj.

La 8-an de decembro

Mi jam decide volis iri en la departementon, sed diversaj kaŭzoj kaj meditadoj detenis min. Pensoj pri la hispanaj aferoj ĝis nun ne povis forlasi mian kapon. Kiamaniere *dona* povas fariĝi reĝino? Oni ne permesos al ŝi heredi la tronon; unue Anglujo ne permesos kaj krom tio la politikaj aferoj de tuta Eŭropo, — la hindo-hungara reĝo ne permesos, nia reĝo . . . Mi konfesas, ke ĉiuj ĉi aventuroj tiel min zorgigis kaj mortigis, ke mi dum la tago tute ne povis ion fari.

Eĉ Maŭro al mi rimarkigis, ke mi, tagmanĝante, estis tre zorgoplena. Kaj precize tiel estas: mi, ŝajnas al mi, estante en distreco, du telerojn faligis sur la plankon, kaj ili tuj rompiĝis. Post la tagmanĝo mi iris al la montoj, sed trovis tie nenion lernindan.

Plejparte mi kuŝis sur la lito kaj meditadis pri la hispanaj aventuroj.

La 43-an de aprilo 2000

La hodiaŭa tago estas tago de plej granda soleno! Hispanujo havas reĝon. Li troviĝis. Tiu reĝo estas mi. Nome — nur hodiaŭ pri tio mi eksciis. Mi konfesas, ke subite kvazaŭ fulmo min lumigis. Mi ne komprenas, kiel mi povis pensi kaj imagi, ke mi estas ia titola konsilanto. Kial povis eniri en mian kapon tiu freneza kaj frenezega penso?! Estas bone, ke oni ne pensis meti min en frenezulejon. Nun antaŭ mi ĉio estas malkovrita. Nun mi vidas ĉion tiel, kiel oni vidas manplaton. Sed antaŭe mi nenion komprenis; antaŭe ĉio estis antaŭ mi en ia nebulo. Kaj ĉio ĉi pro tio, laŭ mia opinio, ke la homoj kredas, ke troviĝas homa cerbo en la kapo; tute ne: ĝin la vento alportas de la Kaspia maro. Mi komencis dirante al Maŭro, kiu mi estas. Kiam ŝi aŭdis, ke antaŭ ŝi staras la hispana reĝo, ŝi kaptis sin per manoj kaj preskaŭ mortis de timo: ŝi estas malsaĝa, — en sia tuta vivo ŝi ne vidis hispanan reĝon. Mi tamen provis trankviligi ŝin per favoraj vortoj, — mi diris al ŝi, ke mi tute ne kole-ras pro tio, ke ŝi iom malbone purigis miajn botojn. Simile al ŝi la popolo estas malklera: al ili oni ne devas paroli pri gravaj aferoj. Ŝi timis, ĉar ŝi estis certa, ke en His-

panujo ĉiuj reĝoj similas al reĝo Filipo II. Sed mi klari-
gis al ŝi, ke inter mi kaj Filipo II tute ne ekzistas simile-
co, kaj ke mi eĉ ne unu kapucenon havas. En la depar-
tementon mi ne iris. Nun diablo estu kun ĝi! Ne, miaj
amikoj, nun vi ne eklogos min: mi ne transskribos plu
viajn abomenindajn paperojn!

La 86-an de martombro, inter tago kaj nokto

Hodiaŭ venis al mi nia ekzekutoro por peti min en la departementon, ĉar mi, li komunikis, pli ol tri semajnojn ne vizitis la oficejon.

Sed la homoj ne estas justaj: ili tenas la kalkulon semajne. Tion la izraelidoj enkondukis, ĉar ilia rabeno samtempe baniĝas. Tamen mi, por ŝerci, iris en la departementon. La sekciestro pensis, ke mi salutos lin kaj petos pardonon. Sed mi rigardis lin indifere — ne tro kolere kaj ne tro favore — kaj sidiĝis sur mian lokon, kvazaŭ nenion rimarkante. Mi rigardis ĉiujn kancelariajn kanajlojn kaj pensis: "Se vi sciis, kiu sidas inter vi!" Sinjoro Dio, kiel vi tiam konfuziĝus! La sekciestro mem tiam komencus saluti min tiel, kiel li salutas la direktoron. Sur mian tablon oni kuŝigis iujn skribaĵojn, por ke mi faru el ili ekstrakton. Sed mi eĉ per fingro ne ektuŝis ilin. Post kelkaj minutoj ĉio tumultigis: oni diris, ke la direktoro venas. Multaj oficistoj kuris antaŭen por montri sin al la direktoro, sed mi eĉ ne moviĝetis. Kiam li iris tra nia sekcio, ĉiuj oficistoj butonumis siajn frakojn, sed mi tute ne! Kia direktoro li estas? Li estas korko, sed ne

direktoro. Li estas ordinara, simpla korko, tia korko, per kiu oni ŝtopas la botelojn kaj nenio pli! Mi plej amuziĝis, kiam oni almetis al mi paperon, por ke mi subskribu ĝin. Ili pensis, ke mi je la fino de la papero subskribos: "Tabl-estro P." — Ne rajtas esti tiel! Sur la ĉefa loko de la papero, kie estus devonta sin subskribi la direktoro de la departemento, mi skribegis: "Ferdinando VIII".

Post tio oni devus vidi, kia respektega silento ekregis, sed mi nur svingis per la mano kaj diris: "Ne estas bezonate fari iujn signojn de reĝaj honoroj!" kaj mi eliris. De tie mi iris rekte en la direktoran loĝejon; li ne estis hejme. La lakeo ne volis enlasi min, sed mi diris al li ion tian, ke li eĉ ektimis. Mi iris rekte en la tualetejon. Ŝi sidis antaŭ spegulo; kiam mi eniris, ŝi desaltis kaj depaŝis de mi. Mi tamen ne diris al ŝi, ke mi estas la hispana reĝo. Mi nur diris, ke feliĉo atendas ŝin, tia feliĉo, kian ŝi eĉ ne povas imagi, kaj ke ni, ne atentante malamikajn intrigojn, estos kune. Mi plu nenion volis diri kaj eliris. Ho, kiel malica estas la virina ekzisto! Mi nur nun komprenis, kio estas virino. Ĝis nun neniu povis malkovri, kiun la virino amas: mi estas la unua, kiu malkovris tion. La virino amas la diablon. Jes, mi ne ŝercas. La fizikistoj skribas sensencaĵojn pri ŝi, ke ŝi estas tio, tio kaj alio, — ŝi amas nur la diablon mem. Ĉu vi vidas, — jen ŝi el loĝio de la unua etaĝo rigardas tra lorneto? Vi opinias, ke ŝi ri-

gardas la dikulon kun ordenoj? Tute ne: ŝi rigardas la diablon, kiu staras post lia dorso.

Jen ĝi kaŝiĝis en la frakon de la sama dikulo kaj balan-
cas al ŝi per fingro! Kaj ŝi edziniĝos kun la diablo, vere
edziniĝos kun la diablo. Kaj ĉiuj rangamantaj patroj de
la samaj filinoj, ĉiuj tiuj, kiuj sin ŝovas ĉien kaj rampas
al la kortego, parolante, ke ili estas patriotoj kaj tio-tio
kaj alio: tiuj ĉi patriotoj deziras monon, monon el la reg-
na kaso! Ili ĉiuj, honoramantoj, kristovendintoj, por mo-
no vendos la patrinon, la patron kaj Dion! Tiu ĉi gran-
da honoramo ekzistas, ĉar la homo havas sub la lango
malgrandan veziketon kun vermeto, kiu similas laŭ sia
grando al pingla kapeto, kaj ĉion ĉi faras iu razisto, kiu
loĝas en Horoĥava strato. Mi ne memoras lian nomon,
sed mi kredas, ke li estas fama, ĉar li kune kun iu akuŝis-
tino volas disvastigi mahometanecon, kaj tial same, oni
diras, en Francujo jam pli granda parto de la homoj kon-
fesas la religion de Mahometo.

Sen dato. La tago estis sen dato.

Mi promenis en Nevskij-prospekto. Preterveturis la imperiestro. La popolo de la tuta urbo salutis lin, mi ankaŭ salutis, tamen mi ne faris eĉ unu signon, ke mi estas la hispana reĝo. Mi opinias, ke ne estas ĝentile malkovri sin sur la strato en la ĉeesto de ĉiuj, ĉar antaŭe estas bezonate prezentiĝi al la kortego. Prezentiĝi nun ne permesas al mi la cirkonstanco, ke mi ĝis nun ne havis hispanan nacian kostumon. Mi deziras trovi hispanan mantelon; mi volis mendi ĝin ĉe la tajloroj, sed ili ĉiuj estas azenoj, krom tio ili tute ne ŝatas sian laboron, ili sin okupas per monakirado kaj estas pli pavimistoj ol kudristoj. Mi decidis fari mantelon el mia nova uniformo, kiun mi vestis nur dufoje; sed, por ke la kanajloj tajloroj ne povu difekti ĝin, mi decidis kudri ĝin mem, ŝlosinte la pordon, por ke oni nenion vidu. Mi distranĉis la uniformon tute, ĉar la fasono de la mantelo devas esti tute alia.

Mi ne memoras la daton.

Ankaŭ monato ne estis.

Estis io, la diablo scias, kio ĝi estis.

La mantelo estas tute kudrita kaj preta. Kiam mi vestis ĝin, la servistino Maŭro ekkriis. Tamen mi ankoraŭ ne decidis prezenti min al la kortego: ĉar el Hispanujo ĝis nun ne alvenis deputitoj. Ne estas ĝentile prezentiĝi sen deputitoj: mia indeco havos nenian gravecon; mi atendas ilin ĉiuhore.

Daton 1-an

Eksterordinare mirigas min la malrapideco de la deputitoj. Kiaj kaŭzoj povus haltigi ilin? Ĉu efektive Francujo? Jes, tiu regno estas la plej ne akcelanta. Mi iris al la poŝtejo por informiĝi, ĉu ne venis hispanaj deputitoj; sed la poŝtestro estas eksterordinara malsaĝulo, — li nenion scias.

—Ne, — li diris, — tie ĉi estas neniuj hispanaj deputitoj, sed, se vi skribos leteron, ni akceptos ĝin laŭ la nuna tarifo.

Je diablo! Kion signifas letero? Letero estas sensencaĵo. Leterojn skribas nur apotekistoj, sed antaŭe malsekigante sian langon per vinagro, ĉar sen ĝi la tuta vizaĝo kovriĝus per likenoj.

Madrido, en februaraĵo trideka

Do mi estas en Hispanujo; kaj tio okazis tiel rapide, ke mi apenaŭ povis resentiĝi. Hodiaŭ matene la hispanaj deputitoj prezentis sin al mi, kaj mi kune kun ili sidiĝis en kaleŝon. La rapideco de nia veturo ŝajnis al mi tre stranga kaj eksterordinara. Ni veturis tiel rapide, ke post duona horo ni atingis la limojn de Hispanujo. Cetere, nun ja en tuta Eŭropo estas fervojoj, kaj la vaporŝipoj veturas eksterordinare rapide. Stranga regno estas Hispanujo! Kiam ni eniris en la unuan ĉambron, mi vidis multe da homoj kun razitaj kapoj. Tamen mi tuj konjektis, ke tiuj ĉi homoj devas esti aŭ granduloj, aŭ soldatoj, ĉar ili razas siajn kapojn. La agoj de la regna kanceliero ŝajnis al mi eksterordinare strangaj: li kondukis min per mano, puŝis min en ĉambreton kaj diris:

—Sidu tie ĉi, kaj se vi nomos vin "reĝo Ferdinando", tiam mi forigos de vi tiun deziron.

Sed mi, sciante, ke tio estas tento, sed nenio pli, respondis neante, pro kio la regna kanceliero per bastono batis min dufoje sur la dorso tiel dolorige, ke mi preskaŭ ekkriis, tamen mi ne ekkriis, memorinte, ke tio estas ka-

valira moro, ĉar en Hispanujo ĝis nun ekzistas kavaliraj moroj,

Restinte sola, mi decidis fari la regnajn aferojn. Mi malkovris, ke Ĉinujo kaj Hispanujo estas unu regno, nur pro malklereco oni opinias, ke ĝi estas du regnoj. Mi konsilas al ĉiuj skribi intence sur papero: "Hispanujo", tiam efektive estos skribita: "Ĉinujo". Sed min tamen eksterordinare ĉagrenis aventuro, kiu devus okazi morgaŭ. Morgaŭ je la sepa horo okazos stranga apero: la tero sidos sur la luno. Pri tio skribas eĉ la glora angla ĥemiisto Wellington. Mi konfesas, kiam mi prezentis al mi la eksterordinaran delikatecon kaj malfortikecon de la luno, mi kore maltrankviliĝis. La lunon ja ordinare oni faras en Hamburgo, kaj oni faras ĝin malbonege. Mi miras, kiel ne rimarkas tion Anglujo. Faras ĝin iu lama barelisto, kaj li estas evidente malsaĝulo, tute ne havas ideon pri la luno: li enmetis en la lunon rezinan ŝnuregon kaj iom da oleo, tial sur la tuta tero estas tia malbonodorego, ke oni devas gardi siajn nazojn, kaj tial la luno estas tia delikata globo, ke sur ĝi ne povas vivi homoj, kaj tie loĝas nur niaj nazoj; pro tio ni ne povas vidi niajn nazojn, ĉar ili ĉiuj trovas sin sur la luno. Kiam mi prezentis al mi, ke la tero estas materio tre peza, povanta, sidiĝinte sur la luno, dismueligi farune niajn nazojn, tiam mi tiel maltrankviliĝis, ke mi, vestinte ŝtrumpojn kaj ŝuojn, rapidegis en la regnan konsilejon por doni al

la polico ordonon malpermesi al la tero eksidi sur la luno. La razitaj granduloj, kiujn mi trovis grandnombre en la regna konsilejo, estis ĉiuj homoj tre saĝaj, ĉar kiam mi diris: "Sinjoroj, ni savu la lunon, ĉar la tero volas si-diĝi sur ĝin!" ili ĉiuj tuj ĵetis sin por plenumi mian reĝan deziron, kaj multaj el ili rampis sur la murojn por preni la lunon; sed en tiu sama momento eniris la kanceliero. La granduloj, ekvidinte lin, diskuris. Mi do, kiel reĝo, restis sola. Sed estas mirinde, la kanceliero ekbatis min per bastono, kaj pelis min en mian ĉambron. Jen tian potencon havas la popolaj moroj en Hispanujo!

*En januaro de la sama jaro,
okazinta post la februaraĵo*

Gis nun mi ne povas kompreni, kio estas la regno Hispanujo. En ĝi la popolaj moroj kaj etiketoj de la kortego estas tute eksterordinaraj. Mi ne komprenas, mi ne komprenegas, tute nenion mi komprenas. Hodiaŭ oni razis mian kapon, malŝatante mian fortegan krion pri mia maldeziro esti monarĥo. Sed mi jam eĉ ne povas memori, kio okazis kun mi, kiam oni komencis gutigi sur mian kapon malvarman akvon. Tian turmenton mi neniam sentis. Mi estis preta furioziĝi, oni apenaŭ detenis min. Mi ne komprenas la signifon de tiu stranga moro. La moro estas malsaĝa, sensenca! Min mirigas la malkonsideremo de la reĝoj, kiuj ĝis nun ne detruis tiun ĉi moron. Konsiderante ĉiujn eblojn, mi konjektas: ĉu ne la inkvizicio kaptis min en siajn manojn, kaj tiu, pri kiu mi opiniis, ke li estas kanceliero, ĉu ne li mem estas la granda inkvizitoro? Tamen mi ne povas kompreni ĝis nun, kiel oni povis inkvizicii la reĝon. Cetere, povas esti, ke tion faris Francujo, kaj aparte Polignac. Ho, tiu Polignac estas sovaĝa besto! Li ĵuris malutili al mi ĝis la morto mem, kaj jen li persekutas min kaj persekutas; sed mi

scias, amiko, ke per vi la anglo gvidas. La anglo estas granda politikisto. Li ŝovas sin ĉien. La tuta mondo scias, ke, kiam Anglujo flaras tabakon, tiam Francujo ternas.

Dato 25

Hodiaŭ la granda inkvizitoro ree eniris mian ĉambron, sed mi, aŭdinte liajn paŝojn, kiam li estis ankoraŭ malproksime, kaŝis min sub seĝo. Vidinte, ke mi ne estas, li komencis voki min. Li komence kriis: "sinjoro Popriŝĉin!" Mi ne respondis eĉ per unu sono. Tiam li kriis: "Aksentij Ivanoviĉ! Titola konsilanto! Nobelo!" Mi daŭre silentis. Fine li kriis: "Ferdinando VIII, hispana reĝo!" Mi volis eligi la kapon kaj rigardi, sed tuj memoris kaj ekpensis: "Ne, frato, vi min plu ne trompos! Mi jam konas vin: vi ree gutigos malvarman akvon sur mian kapon." Tamen li rimarkis min kaj elpelis per bastono de sub la seĝo. La malbenita bastono eksterordinare dolorige batas.

Cetere, pro ĉio ĉi min rekompencis mia nuna elpenso: mi eksciis, ke ĉiu koko havas propran Hispanujon, — ĝi havas ĝin sub la plumoj apud la vosto. La granda inkvizitoro foriris de mi tre kolera, minacante min per ia puno. Sed mi tute malŝatas lian senfortan koleremon, sciante, ke li agas kiel maŝino, kiel instrumento de la anglo.

Da 34 to. mt. jrao, o.ɪvniqəʃ 349

Ne, mi ne plu havas fortojn por toleri! Dio, kion ili faras kun mi! Ili verŝas sur mian kapon malvarmegan akvon! Ili nek atentigas, nek aŭdas, nek vidas min. Kion mi faris al ili? Pro kio ili turmentas min? Kion ili volas de malriĉa mi? Kion do mi povas al ili doni? Mi nenion havas. Mi ne havas eblojn kaj fortojn por elteni iliajn turmentegojn; mia kapo brulas kaj ĉio turniĝas antaŭ mi. Oni savu min! Prenu min! Oni donu al mi triopon da ĉevaloj rapidegaj kiel ventego! Sidiĝu mia veturigisto, sonu mia sonorileto, ekkuregu miaj ĉevaloj, kaj forveturigu min de tiu ĉi mondo! Veturigu min pluen, por ke mi vidu nenion, tute nenion. Jen la ĉielo ondiĝas antaŭ mi; steleto briletas en la malproksimo; kvazaŭ arbaro kuras kune kun la arboj kaj la luno; nigrablua nebulo kuŝiĝas sub la piedoj; ie kordo sonas en la nebulo; je unu flanko estas vidata maro, kaj je la dua — Italujo; jen eĉ rusaj vilaĝaj dometoj vidiĝas. Ĉu tio ne estas mia domo malproksime bluiĝanta? Ĉu ne mia patrino sidas antaŭ la fenestro?

Patrinjo, savu vian malriĉan filon! Perdu unu vian larmeton sur lian malsanan kapeton! Vidu, kiel ili turmen-

tas lin. Prenu lin, malriĉan orfeton, al via brusto! Li ne havas lokon en la mondo! Oni lin persekutas! Patrinjo, vi bedaŭru pri via malsana infano! . . . Kaj ĉu oni scias, ke la alĝeria provincestro sub la nazo mem havas tuberon?

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-206-9